Bulgara

# ESPERANTISTO

I 19479 / 48 (1979)




1
1979



El la sudbulgara junulara konferenco. Raportas Kanju Kanev (paĝo 6)

La partoprenantoj en renkontiĝo de e-istoj en Gâlâbovo (p. 5)



La e-istoj de Ukrajno organizis respublikan konferencon la 5—8an de novembro 1978 en u. Ĥmelnickij.

La 7an de novembro ili partoprenis la manifestacion okaze de la Granda Oktobra Revolucio, organizinte apartan grupon, kun esperantlingvaj sloganoj lige kun la Revolucio kaj kontraŭ la neŭtrona bombo.




*ENHAVO*

N. Tonkin. Novjara mesaĝo . . . . . . 1
* * * Verda tabulo . . . . . . . . . 2
N. Zlatina. Al la patrolando . . . . . 3
* * * El la vivo de bulgaraj esperantistoj 3—9
M. Jankova, I. Ĉulev Nia prezidanto . . 9
* * * Tre grava. Konkurso de „Bulgara Esperantisto" . . . . . . . . . . 9
R. Konstantinova. Gaste al E-veterano . 10
S. Milanov. La filino sekvas la vojon de la patro . . . . . . . . . . . . . 11
V. Ŝiŝko. Belorusa SSR en la soveta-bulgara kunlaboro . . . . . . . . . . 13
* * * El la vivo de sovetaj esperantistoj 15
N. Nikolov. Por vasta organizita E-turismo . . . . . . . . . . . . . . 16
C. Apreotesei. E-novaĵoj el Rumanio . 16
D. Valecillos. Letero el Venezuelo . . . 16
E. Lippe. Neĝoviro. Paĉjo, panjo, mi kaj la tamburo . . . . . . . . . . . . III
S. Kostadinov. Pensoj de eminentaj bulgaroj, naskitaj en januaro . . . . . . III
Asen Grigorov, Dimitro Denĉev. Mia kanto . . . . . . . . . . . . . . . IV

**Sur la kovrilpaĝo:**

Partoprenantoj en la Landa Studenta Renkontiĝo (vidu paĝon 8)

Korektis: **Rajna Konstantinova**

Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 31-00-29

## GAJAJ E-TAGOJ EN SOFIO

Je la 1—7 de aprilo 1979 en Sofio okazos Gajaj E-Tagoj. En la programo estas: vizito de teatraj spektakloj, ekskurso, konkursoj pri humuraj rakontoj, verŝaĵo, skeĉo, projekciado de diapozitivoj je temo „Tra Esperantio" ka.

Konkursaĵojn sendu al: *Monda Turismo, P. K. 45, 1090 Sofio, Bulgario.*

**La redakcio sincere dankas pri la novjaraj gratuloj kaj bondeziroj de siaj multnombraj legantoj kaj ankoraŭfoje deziras al ĉiuj sanon, feliĉon kaj novajn, ĉiam pli grandajn E-sukcesojn dum 1979!**

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JANUARO
1979
1
JARO 48

# *NOVJARA MESAĜO*

*Kvankam ideoj de elementa justeco enpenetris diversajn aspektojn de la homa vivo, ili ne enpenetris ĉiujn. Bazaj principoj de rasa egaleco estas hodiaŭ larĝe akceptitaj, eĉ se ili ne estas ĉiam aplikataj. Vastiĝas principoj de seksa egaleco, kaj de religia. Sed la lingva egaleco ankoraŭ postrestas.*

*En la nunaj tagoj en multaj landoj oni festas la tridekan datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. UEA mem deklaris la periodon de la 10a ĝis la 15a de decembro Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto. Landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj kunlaboras por fari specialajn aranĝojn dum tiu Semajno, per kiuj ili donas apartan atenton al la Universala Deklaracio kaj altiras la publikon por emfazi ĝiajn lingvajn aspektojn.*

*Tiuj lingvaj aspektoj de la Deklaracio estas relative neglektataj. Diskriminacio kontraŭ homoj nur pro la lingvo, kiun ili parolas, estas tre ofta hodiaŭa fenomeno. Eĉ la grandaj internaciaj organizaĵoj aplikas lingvan diskriminacion en la propra laboro, kiam ili favoras certajn lingvojn kaj malatentas aliajn. En sia insistado pri lingva egaleco Universala Esperanto-Asocio laboras por severe neglektata aspekto de la homa justeco, kiu estas eksplicite menciita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.*

*En la morgaŭa mondo la simplaj fizikaj bezonoj, la interrilato de la monda ekonomio, la denseco de la homa komunikado — ĉio ĉi igos la diversajn naciojn ne plu sendependaj, sed interdependaj. Tiu epoko jam alvenadas. Por konservi la diversecon de la kulturoj, la diversajn alirojn al la homaj feliĉo kaj justeco, oni bezonas homan komunikilon, kiu ne favoras unu nacion super alia, sed traktas ĉiujn egalaj. Oni bezonas lingvon, kiun oni povas lerni relative facile, sed kiu kapablas esprimi ĉion lingve esprimeblan. Oni bezonas lingvon, kiu povas ligi la ordinarajn civitanojn de la mondo, do ne nur la elitojn, per senperaj ligiloj.*

*La morgaŭa mondo povus enteni la promeson de tutmonda lingva komunikado por ĉiu civitano: La internacia lingvo Esperanto estas la hodiaŭa garantio de tiu morgaŭa ebleco.*

*Por lokaj kaj naciaj bezonoj ni uzu lokajn kaj naciajn lingvojn; ja ĉiu lingvo havas sian rolon. Sed por internacia komunikado ni uzu unuavice la efikan kaj jam elprovitan Internacian Lingvon. Ĝi ne forigu la naciajn lingvojn, sed konservu ilin en nova lingva ordo.*

*En la laboro por Esperanto la jaro 1978 estis brila jaro. La Universala Kongreso de Esperanto ĉi-jare renkontigis 4 400 homojn el kvindeko da landoj en la dua plej granda kunveno en la tuta historio de la lingvo. En multaj mondopartoj novaj grupoj de homoj aŭdis la novaĵon de Esperanto kaj eltrovis ĝian utilon kiel rimedo por vera internaciismo kaj kiel forta apogilo de la paco.*

*Aliaj kononcis utiligi ĝin por pure praktikaj bezonoj — en universitatoj, en komerco, en vojaĝado, por faciligi internaciajn kontaktojn. La kresko de intereso pri Esperanto en Latinameriko estas bona ekzemplo de tiu nova kaj instiga dinamismo.*

*La kreskanta atento al Esperanto estas tuj komprenebla. En mondo, kiu perdadas siajn idealojn, ĝi prezentas bonan kaj indan idealon. En mondo, en kiu la transnacia komunikado intensiĝas, kaj la bezono alpreni teknikon kaj sciojn el aliaj landoj kreskas, Esperanto prezentas perfekte simplan solvon.*

*Necesas, ke la jamaj parolantoj de Esperanto kune laboru en konscia harmonio por alporti al pli da homoj tiun ĉi modernan miraklon de la komunikado. Ni ĉiuj havas niajn diversajn alirojn al mondaj problemoj, al politiko, al sociaj demandoj, eĉ al persona filozofio, sed unuigas nin la lingvo, kiun ni parolas. Tio estas potenca kaj nedisigebla ligilo.*

*La jaro 1979 estas promesplena jaro. Esperanto kaj la laboro por Esperanto intensiĝas, firmiĝas, kaj — eble plej grave — disvastiĝas vere tra la tuta mondo. La atingoj de 1978 daŭru kaj duobliĝu tra 1979. Tio okazos, se ni tenos nin firme je la celo kaj en ĉiuj niaj rilatoj kun aliaj homoj ne forgesos tiun celon — la senperan, egalecan, internacian lingvan komunikadon.*

*Zamenhof-Tago 1978*

*HUMPHREY TONKIN*

*prezidanto de UEA*



## *VERDA TABULO*

*Denove en la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto" brile distingiĝis nia plej fervora aktivulo k-do DIMITRO IVANOV el Plovdiv.*

*Dank' al sia amo al Esperanto, alta esperantista konscio, obstino kaj laboremo li kolektis 152 abonojn al „BE" por 1979j! Samtempe k-do Ivanov kolektis 6 abonojn por „Paco", 8 por „Scienca Mondo", 8 por „der esperantist", 3 por „Pola Esperantisto", 2 por „Hungara Vivo" kaj la membrokotizon de 117 membroj.*

*Ni gratulas kaj dankas k-don Ivanov pro lia fervora laboro kaj brila rezulto!*

*Samtempe ni varme alvokas ĉiujn aktivulojn daŭrigi la varbadon de abonoj por nia asocia organo — organizanto, informanto, instruanto kaj edukanto de la bulgaraj esperantistoj. La kolektitajn sumojn sendu al la kancelario de BEA. Aparte sendu la nomojn kaj adresojn de la novaj abonantoj.*

*Ni nepre atingu 6100!*

Nadja Zlatina

## AL LA PATROLANDO

Mi amas vin per mia tuta koro,
ho tero kara, kara vi ĉiel'!
L'aŭroron amas en matena horo,
impeton vian al la sankta cel'!

Vi, Bulgario, estas unuura
inter la landoj de la tuta ter'.
Vi min prilumas per la flamo pura,
patrino mia, amo kaj fier'.

Arbaroj viaj flustras mil legendojn
pri la bravuloj, kiujn naskis vi.
En mia pulso batas viaj sentoj
kaj per espero via spiras mi.

Vi estas glavo en la temp' batala,
en paco — tenereco kaj kares'.
A! la unuaj estas vi egala
laŭ ritmoj de labor' kaj de progres'.

Kiam vojaĝas mi en land' alia,
al vi fidela restas mia kor';
kaj harmonias la horloĝo mia,
kuniras ĉiam je la sama hor'.

Ho, kara mia tero patrolanda,
kun kanto al estonto flugas vi!
Pro la impeto, pro l' beleco granda —
pro ĉio vin mi dankas, amas mi!

## LA HOMAJ RAJTOJ KAJ ESPERANTO

Tio estis la temo de pluraj E-kunvenoj tra la tuta lando dum la Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto, kiun UEA lanĉis lige kun la 30-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (UD), akceptita de UNO en 1948 j., kaj la 119a naskiĝtago de Zamenhof.

Koncize ni notos nur kelkajn kunvenojn.

**Pazarĝik.** Antaŭ tre bone vizitita kunveno en la Junulara Domo okazis solena vespero, dediĉita al la Homaj Rajtoj kaj Esperanto. La kunveno estis organizita de E-societo „Radio" kaj la Urbaj Komitatoj de Patrolanda Fronto kaj Komsomolo. Ĉeestis la prezidantino kaj sekretariino de UK de PFronto. Raporton faris la prezidanto de DE de BEA Petko Arnaudov. En la belarta programo krom malnovaj e-istoj partoprenis ankaŭ la triaklasanoj, lernantaj E-on sub la gvido de Mimi Peeva, kaj la kursanoj de Magdalena Georgieva.

Post la kunveno — amika vespermanĝo en restoracio, kiun partoprenis ĉ. 50 e-istoj el la urbo kaj la distrikto.

R. G.

**Jambol.** Amasa kunveno pri Zamenhof kaj la Homaj Rajtoj okazis en la moderna salono de la Sindikata Domo. Raportis Dimitro Ĥristov — vicprezidanto de la Distrikta - Urba Estraro de BEA. En la riĉa belarta programo partoprenis ankaŭ la artistino Galja Kostova, kiu kantis dum UK de E-o en Varno.

St. P-a

**Sofio.** En tuturba kunveno, tre bone vizitita de la sofiaj e-istoj, raporton faris Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM. Li substrekis, ke la afero de Zamenhof estas reala kontribuo en la batalo por triumfo de la ideoj pri estimo al la homa digno, pri la Homaj Rajtoj kaj liberecoj. Ni, la bulgaraj e-istoj, ĉiam laboris kaj laboros por plenumo de la spirito kaj la litero de la Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Estis prezentita belarta programo, en kiu aparte distingiĝis la malgrandaj lernantoj de Miĥail Elenov.

**Târgovište.** En la urbo okazis kunveno dediĉita al la 30-jariĝo de UD kaj la naskiĝtago de Zamenhof — la homo, kies tuta vivo pasis en laboro kaj batalo por rajtoj kaj liberecoj de la ordinara homo. Estis aprobita telegramo al la Nacia Komitato de la Paco kaj CE de BEA.

D. T.

**Ŝumen.** La solena kunveno de E-societo „Vekiĝo" okazis en la bela klubejo „Juneco", disponigita fare de la Sindikata Kulturdomo. Malfermo — per la esperantista himno, plenumita de la grupo „Verdaj Najtingaloj". En sia prelego la prezidanto de DE de BEA Cvjatko Todorov atentigis pri du gravaj momentoj: la okazanta en Sofio Internacia Teoria Konferenco pri Konstruado de Socialismo kaj Komunismo kaj la Mondevoluo" kaj la 30-jariĝo de UD, montrante la taskojn de la bulgaraj e-istoj lige kun ili.

En la programo sekvis informoj en bulgara lingvo kaj E-o pri interesaj kaj ne tre konataj faktoj el la vivo de Zamenhof, pensoj de Zamenhof kaj aliaj eminentaj homoj pri E-o, recitadoj kaj kantoj.

La kunveno akceptis telegramon al la Nacia Komitato de la Paco. Oni esprimis volon batali por paco, por senarmiĝo kaj malpermeso de la abomena kontraŭhoma neŭtrona bombo.

St. G.

Loveĉ. Pli ol 70 personoj kolektiĝis en la Distrikta Kulturdomo por celebri la naskiĝtagon de Zamenhof, la Esperantan Libron kaj la 30-jariĝon de UD. La kunveno estis organizita de la novefondita Klubo de la Esperantisto ĉe la Kulturdomo.

Priokazan raporton faris Coĉo Kolarov, prezidanto de la Klubo. Estis prezentita altnivela belarta programo kaj arangita ekspozicio el esperantaĵoj.

**I. I.**

**Kazanlâk.** En amase vizitita kunveno lige kun la naskiĝtago de Zamenhof kaj la 30-jariĝo de UD de Homaj Rajtoj raporton faris Neli Cankova, E-instruistino en v. Enina. Estis prezentita belarta programo.

**K. Ĉ.**

## JUBILEO DE E-SOCIETO „PROGRESO"

Neforgesebla estis la celebro de la 15-jara jubileo de E-societo „Progreso" en la Kombinato por Ŝarĝaŭtoj „Madara" en u. Ŝumen. Ĝi okazis solene en la reprezenta halo. Ĉeestis la sekretario de BEA Kr. Karucin, reprezentaj E-grupoj el la Unuiĝitaj Uzinoj „Balkan" (Loveĉ) kaj uzino „G. Dimitrov" (Ruse), e-istoj el Preslav, Dimitrovgrad ka.

Priagadan raporton faris la prezidanto de „Progreso" Petro Nenov.

En sia salutparolado k-do Karucin alte taksis la agadon de la societo, substrekante, ke en la sistemo de la maŝinkonstruado „Progreso" estas modelo por la ceteraj E-societoj. La prezidanto de DE de BEA Cvjatko Todorov, salutante la societanojn, substrekis la tre favorajn kondiĉojn por E-o en la socialismaj landoj kompare kun la kapitalismaj.

Salutojn prezentis ankaŭ la sekretariino de la uzina partia komitato T. Raeva, Nadeĵda Konjarska, kiu gvidis la unuan E-kurson en la Kombinato, reprezentantoj de la gastantaj grupoj.

La solenaĵo finiĝis per riĉa belarta programo, organizita de la Kulturdomo ĉe la Kombinato, kiun partoprenis artistoj el la urba dramteatro „Vasil Drumev".

La sekvan tagon la gastoj konatiĝis kun la vidindaĵoj de la urbo.

**Rangel Ĝonev**

## NI FONDIS KLUBON DE LA E-ISTO

La valorigo de la libera tempo de la laboruloj estas serioza klopodo de la Sindikata Kulturdomo en Loveĉ. Unu el la formoj tiucele estas la kluboj laŭ interesoj.

La 30-an de novembro 1978 dudek kvin aktivaj adeptoj de la Internacia Lingvo kolektiĝis en la Distrikta Sindikata Kulturdomo por fondi Klubon de la Esperantisto. Rosica Pârvanova, kiu respondecas pri la kluboj laŭ interesoj, klarigis la celojn kaj taskojn de tiu ĉi nova formo de agado. Unu el la celoj estas ankaŭ la popularigo de niaj sindikataj aktivecoj en fremdlando pere de korespondado kaj personaj kontaktoj.

Estis elektita 5-membra Estraro de la Klubo kun prezidanto Coĉo Kolarov — redaktoro en la distrikta ĵurnalo „Zarja na Komunizma". En la plano pri agado ni antaŭvidas renkontiĝojn kun ordenhonoritoj, instruistoj, membroj de la samspeca klubo en u. Gabrovo, aranĝi ekspoziciojn ktp. Do per variaj formoj oni perfektigos siajn lingvokonojn.

**Ilija Ivanov**

## PLENKUNSIDO EN JAMBOL

La 26an de novembro 1978 en Jambol okazis plenkunsido de la Distrikta-Urba Estraro de BEA. Ĝi estis malfermita kaj gvidata de la E-veterano Ĉonju Panĉev.

La prezidanto de DUE Dimo Trudoljubov raportis pri la antaŭstarantaj taskoj. Li atentigis pri jenaj plej gravaj: organiza stabiligo de la E-movado en Jambol kaj ĝia distrikto, sukcesa finiĝo de la E-lernojaro (jam estis malfermitaj 9 kursoj) kaj pretigo de kursgvidantoj, la abonkampanjo de „BE", kolektado de la membrokotizoj kaj la Nacia Mezlernejana E-Konferenco, okazonta en Jambol je la 1—2 de februaro 1979.

Sekvis vigla diskutado. Fine estis akceptita rezolucio pri la estonta agado.

**Violeta Milkova**

## FONDITA ŜAK-SEKCIO DE BEA

La 25an de novembro 1978 en Kazanlâk okazis fonda kunveno de ŝak-sekcio de BEA.

Gastoj de la kunveno estis Kunĉo Vâlev — sekretario de BEA, Kiril Ĉindin — prezidanto de la urba societo „Roza valo", inĝ. Leonid Jordanov, eksa EŜLI-peranto en Bulgario. Raporton pri la ĝisnuna agado de la bulgaraj e-istoj-ŝakistoj faris Ivan Vojnov, nuna peranto de EŜLI (Esperantista Ŝak-Ligo Internacia).

La novefondita sekcio konsistas el 30 ŝakistoj, inter kiuj estis elektita jena estraro: inĝ. Anatolij Haĝiivanov — prezidanto, Ivan Vojnov — sekretario, Margarita Varenĉak — kasisto (ĉiuj el Sofio), Ganĉo Jordanov (Kazanlâk) — propagando, Peĉo Vlaĥov (Loveĉ) — redaktoro. Okaze de la kunveno la loka ŝakklubo organizis fulmrapidan turniron, en kiu venkis ŝakmajstro

Kojĉo Mihov. Inter la e-istoj plej bone prezentis sin inĝ. A. Haĝiivanov. En la nomo de la loka E-societo la venkintoj ricevis donacojn kaj memorflagetojn.

Nun antaŭ la ŝakistoj-e-istoj staras gravaj kaj interesaj aranĝoj: partopreno en individua ĉampioneco de ESLI kaj en la III Teama Turniro de EŜLI en koresponda ŝako, partopreno en 9-a Ŝakfesto en Kaloĉa (Hungario) ka.

Ni invitas ĉiujn bulgarajn ŝakistojn-esperanistojn aliĝi al nia sekcio: Skribu al Ivan Vojnov, str. Bjalo More 8, 1527 Sofio.

**Ivan Vojnov**

## E-AKTIVECOJ EN GÂLÂBOVO

● Per solena kunveno estis malfermita la nova lernojaro en u. Gâlâbovo, distrikto Stara Zagora. Komenciĝis elementa kurso, kiun partoprenas 26 kursanoj, inter kiuj ankaŭ 4 vjetnamaj junuloj kaj unu rusino.

●28 e-istoj el u. Gâlâbovo partoprenis libervolan laborbrigadon helpe al la vilaĝmastrumo. Frumatene per aŭtobuso kun flirtantaj verdaj flagoj la brigadanoj traveturis la urbon kaj direktiĝis al v. Razdelna. Tie ili rikoltis 4200 kg da vinberoj de la speco „Kaberne". La gvidantaro de la Agrar-Industria Komplekso esprimis dankon al la laboremaj brigadanoj.

En la amika konkurado por rikolto de laŭeble pli granda kvanto da vinberoj unuan lokon okupis Kao Fi Than, la duan — Kojĉo Berov, la trian — Veneta Vasileva, Vo Hong Lan, Penka Zlateva, Miluŝ Ĵelev, Stefan Jovkov kaj Tatjana Koleva.

La membroj de E-societo „Kolombo de la Paco" en u. Gâlâbovo apelacias al ĉiuj bulgaraj e-istoj amase kaj organizite partopreni laborbrigadojn helpe al la nacia ekonomiko.

**R. Radev**

●Laŭ iniciato de E-societoj „Kolombo de la Paco" (Gâlâbovo) kaj „Nigra Maro" (Burgas) en Gâlâbovo okazis granda E-renkontiĝo dediĉe al la 61-a datreveno de la Granda Oktobra Revolucio. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ e-istoj el la urboj Mâglîĵ, Jambol, Samokov, Dimitrovgrad kaj Madan.

Post plenumo de la esperantista himno parolis la prezidanto de la E-societo en Gâlâbovo k-do Kanju Kanev.

Li substrekis la historian signifon de la Granda Oktobro por ni kaj por la popoloj de la tuta mondo kaj emfazis la taŭgecon de E-o por disvastigi tutmonde la veron pri nia ĉiurilate supreniranta patrolando, kie la homoj vivas ĉiam pli kaj pli feliĉe, ĝuante tiajn rajtojn kaj liberecojn, kiajn en neniu kapitalisma lando la popolamasoj havas kaj povas havi. K-do Kanev parolis ankaŭ pri la varma amikeco, kiu kreiĝis inter la e-istoj de Gâlâbovo kaj Burgas, kaj emfazis la tre bonefikan rolon, kiun similaj renkontiĝoj ludas por pliviglig de la E-movado.

K-do Nikola Petrov, prezidanto de „Nigra Maro", dankis pro la varma akcepto, kiun ili trovis en Gâlâbovo, kaj esprimis la esperon, ke la amikeco inter ambaŭ societoj kreskos konstante.

Sekvis riĉa belarta programo. La unua salutkantoj estis dediĉitaj al generalo Dimitro Polihronov, aktiva kontraŭfaŝisma batalanto kaj gvida e-isto el Burgas, kaj al k-do Dinju Balikov — ĉefredaktoro de ĵ. „Gâlâbovska Iskra" (Fajrero de Gâlâbovo) kiu amike subtenas la E-movadon.

Post kvizo (viktorino) kaj tombolo venis la horo de la dancoj — popolaj kaj modernaj. Pli ol 120 homoj partoprenis ilin ĝis la 4,30 h. matene. Sekvis ripozo de 4 horoj kaj denove ĉiuj kolektiĝis antaŭ la E-klubejon. De tie per aŭtobuso kaj aŭtoj ili ekveturis al la Termo-Elektra Centralo „Pârva Komsomolska" (Unua Junkomunista), kiun ili kun intereso trarigardis. Reveninte en la klubejon ĉiuj denove sin donis al kantoj, ludoj, ŝercoj, amikaj interparoloj, fotado. Por la bona humoro kontribuis ankaŭ la feste ornamitaj ejoj per Esperantaj, naciaj kaj partiaj flagoj, per sloganoj kaj afiŝoj.

**Goĉo Koev**

---

En novembro pro aŭtoakcidento forpasis en Dimitrovgrad 59-jara nia sindona samideano



*Ĵeko Zaprjanov*

Li estis fervora aganto de la enlanda kaj eksterlanda E-movado, multjara membro de la Centra Estraro de BEA. Kiel ĵurnalisto Ĵ. Zaprjanov multe kontribuis por la propagando de E-o per la loka kaj distrikta gazetaroj. Ni kondolencas!

La intereso al E-o en u. Pernik kaj ĝia distrikto videble vigliĝis. Pri tio parolas la komenciĝo de la nova lernojaro de E-o.

En Pernik la solena malfermo okazis en la salono de E-societo „Nova Vojo", kie kolektiĝis multaj malnovaj kaj novaj e-istoj kaj simpatiantoj. Prelegon je temo „Esperanto kaj la internacia edukado" faris Nikola Mitev.

En la urbo ekfunkciis kelkaj kursoj:

por civitanoj — elementa kun 25 partoprenantoj kaj progresanta — kun 12 personoj, ambaŭ gvidataj de Pera Ivanova;

en la junpionira domo — elementa por 12 lernantoj, gvidata de Cvetana Zareva;

en IV-a gimnazio — por progresintoj (15 lernantoj) sub la gvido de Marica Popova.

Ĝojiga estas la fakto, ke ankaŭ en u. Radomir, kie multjare la E-afero stagnis, nun komenciĝis E-vivo. En la salono de la restarigita E-societo okazis bone vizitita kunveno, por kies organizo pleje kontribuis la noveelektita societa prezidanto Georgi Markov. Prelegon faris same Nikola Mitev. Ĉeestis multaj membroj de la DE de BEA.

Post la kunveno ekfunkciis elementa E-kurso kun 35 partoprenantoj, kiun gvidas Spiro Nedjalkov — prezidanto de DE.

En u. Trân en la konstrua mezlernejo la diplomita kursgvidantino de E-o Vetka Todorova ekgvidis elementan kurson por 30 lernantoj.

**N. Mitev**

# Juna esperantisto

## *SUDBULGARA JUNULARA E-KONFERENCO*

Laŭ iniciato de la junulara sekcio de BEA (BEJ) la 26an de novembro 1978 en Stara Zagora okazis E-konferenco je temo „Kiel ni laboras por altiri kaj reteni la junularon". Partoprenis la konferencon pli ol 100 societaj estraranoj (plejparte prezidantoj kaj sekretarioj), estraranoj de junularaj E-grupoj kaj societoj kaj apartaj aktivuloj el la distrikto de Suda Bulgario.

En la laboro de la konferenco partoprenis la sekretarioj de BEA Kunĉo Vâlev kaj Krâstju Karucin kaj la prezidanto de BEJ Dimitro Papazov.

Bazan raporton en la konferenco faris Kanju Kanev, prezidanto de E-societo „Kolombo de la Paco" en u. Gâlâbovo. Li koncize priskribis la tre sukcesan laboron de la societo inter la junularo. (La raporton ni donas aparte).

En la diskutado partoprenis Emil Ĉirpanski (Dospat), Svoboda Damjanova (Kazanlâk), Peju Peev (Pazarĝik), Elena Stojkova (Burgas), Ŝterju Kukuŝev (Peŝtera), Slavi Janulov (St. Zagora), Ĉudomir Kantarĝiev (Sliven), Kr. Karucin. Ili prezentis riĉajn spertojn, el kiuj sekvis gravaj rekomendoj: nepre organizi duagradan kurson por gejunuloj, vastan internacian korespondadon, ekskursojn al eksterlando, balojn, laborbrigadojn, ekspoziciojn, abonojn de eksterlandaj amikoj al niaj E-periodaĵoj, vizitadon kaj helpadon de malsanaj e-istoj, kolektadon de rememoroj de E-veteranoj, intersocietajn renkontiĝojn ktp. Nepre oni devas junigi la societajn estrarojn; nepre altiri la laboristan junularon.

La eldirojn kompletigis per entuziasmiga parolo k-do Kunĉo Vâlev.

Fermante la konferencon, k-do D. Papazov substrekis la neceson nepre kaj vaste labori kune kun la komsomolaj societoj. Jam estas interkonsento kun CK de Komsomolo, ke la junularaj societoj kaj grupoj fariĝu kolektivaj membroj de la junularaj kluboj por internacia amikeco. Tie estas kaj la junularo, kaj riĉa materiala bazo por multe pli fruktodona laboro por E-o.

## *Varia ekskurso*

Okaze de la Sudbulgara Junulara E-Konferenco (26an de nov. 1978) 35-membra grupo de la sofiaj E-societoj „Vasil Levski" (junulara) kaj „Vela Peeva" (studenta) gastis en u. Kazanlâk.

La grupo havis la eblecon viziti kaj trarigardi la faman tracan tombejon kaj la muzeon de la antikva traca arto en nia lando. Vespere — kunveno kun la lokaj e-istoj, antaŭ kiu k-do Miĥail Ŝekerĝiev projekciis kolorajn diapozitivojn pri Islando kaj la 62a UK de E-o en Rejkjavik, donante abundajn informojn pri tiu interesa lando kaj popolo.

La junuloj partoprenis ankaŭ la fondan kunvenon de Saksekcio de BEA.

La 26an matene la grupo forveturis al Stara Zagora, kie ĝi partoprenis la junularan konferencon kaj trarigardis la vidindaĵojn de la urbo.

**E. Georgiev**

*Kanju Kanev*

## EFIKA LABORO INTER LA JUNULARO — NIA ĈEFA TASKO

### *El la spertoj de E-societo „Kolombo de la Paco" — u. Gâlâbovo*

Post la grandioza 63a UK de E-o en Varno kaj la 34a Internacia Junulara E-Kongreso en Veliko Târnovo ni devas utiligi la kreitan entuziasmon kaj favorajn cirkonstancojn en nia lando por plua organiza stabiligo de BEA kaj plimultigo de ĝia membraro, por ĝia ĉiuflanka florado, por penetrigo de E-o en la praktikon. Aparte grandan atenton ni devas doni al la junularo — altiri kaj reteni ĝin en niaj vicoj, eduki ĝin, forĝi novajn junajn E-kadrojn de nia Movado, certigi kontinuecon inter la malnova kaj nova generacioj de bulgaraj e-istoj. Taksante la efikan laboron inter la junularo kiel taskon n-ro 1, la estraro de nia E-societo gvidis sin ĉiam de la devizo: „Kiu havas la junularon, tiu havos la estontecon." Jen kelkaj momentoj el nia laboro por altiro kaj reteno de la junularo.

Unue mi substrekos, ke ni laboras laŭ duonjaraj planoj, kiujn ni ellaboras surbaze de la taskoj, donataj de la Centra kaj Distrikta Estraroj, kaj konforme al la kondiĉoj en nia urbo. Ĉion ni faras por eduki en la junaj homoj amon kaj fidelecon al E-o, eduki ilin kiel moralajn, konsciajn civitanojn. Por aktivigi la junajn homojn ni donas al ili respondecajn postenojn en la estraroj — la fido multigas ilian energion kaj iniciatojn. Por ke ĉiu societa membro povu trovi plej konvenan lokon por siaj ŝatoj kaj preferoj, ĉe la societo funkcias kelkaj grupoj — junulara, turista, fo-ki-ma (foto-kino-magnetofona), aŭtomobilista. En la estraroj de tiuj grupoj estas multaj junaj homoj, precipe junuloj estas ties prezidantoj. Neniam ni forgesas la regulon: „Ĉiu povas esti utila."

Por variigi la vivon kaj agadon de la junaj e-istoj bone helpas la jam elprovitaj formoj: baloj, vesperoj dediĉe al notindaj datrevenoj, vesperamuzoj, celebroj de naskiĝdatoj de e-istoj, laborbrigadoj, ekspozicioj, konkurado, salutoj al distingiĝintaj e-istoj pere de la urba radio-reto, ekskursoj enlande kaj eksterlande.

La kolektiva metodo estas karakteriza por nia vivo kaj agado. Por efektivigi iun aranĝon, kia ajn ĝi estas laŭ siaj dimensioj, ni faras konkretan planon, fiksante en ĝi respondeculojn kaj datojn, ĝis kiam ilia tasko devas esti plenumita. La respondeculoj periode raportas antaŭ la societa estraro, kiel marŝas ilia laboro. Tiel ni faras kontrolon de la taskoplenumado kaj sistempe helpas, se tio montriĝas necesa. Se oni donas taskon eĉ al nesufiĉe konscia membro, aperas ĉe li interna impulso plenumi ĝin. Du-tri tagojn antaŭ la okazigo de la aranĝo ni faras ĝeneralan kontrolon de la preteco.

Kiel mi menciis, por variigi la vivon de la junaj homoj ni aranĝas balojn — printempajn, abiturientajn ka. Ĉi tie mi rakontos pri nia ĉi-jara balo, kiu okazis la 25an de marto. La estraro de la societo kaj la estraro de la junulara sekcio decidis, ke la balo okazu en tia loko, kie povas kreiĝi vere intima atmosfero, la muziko kaj la dancado ne ĝenu la civitanojn en najbaraj domoj, do la tempo de restado en la ejo ne estu limigita — oni kantu kaj dancu ĝis plena satiĝo. Kiel plej konvenan lokon oni elektis la ripozdomon de la Briketa Fabriko, kiu situas je 5 km de la urbo, en arbaro. Ni invitis ankaŭ la e-istojn el la urboj Jambol, Mâgliĵ kaj Marica. Kolektiĝis pli ol 100 personoj. Dum la balo al la partoprenantoj oni disdonis diversajn maskojn. Surbruste brilis verdaj papersteloj kun numeroj. Okazis konkursoj pri plej bona dancanto de malnovaj kaj modernaj dancoj, de popoldancoj, konkurso pri „mis kaj mister Esperanto". Al la gajnintoj oni donis objektajn premiojn. Estis prezentita belarta programeto. Okazis ankaŭ tombolo, kvizo („viktorino"). Post la 22-a horo — „La mikrofono — je via dispono!" Tiam ĉu per kanto, ĉu per humuraĵo, ĉu per tromplertaĵo ĉiu klopodis kontribui por ankoraŭ pli gaja, pli agrabla atmosfero. Tiel — ĝis la mateno. Post 4-hora ripozo la gastoj vizitis la termoelektrajn centralojn „Pârva Komsomolska" (Unua Junkomunista) kaj „Marica Iztok — 3". Post tio denove okazis dancoj, kantoj, amuzado — jam en la klubejo. Apenaŭ je la 18 h. ĉiuj disiris plenkontentaj — satdancintaj, satgajintaj, elprovintaj praktike siajn kapablojn paroli en E-o.

Ni ofte organizas renkontiĝojn — ne nur kun e-istoj el la distrikto, sed ankaŭ el aliaj distriktoj. Ĉe diversaj aranĝoj venis e-istoj el Burgas, Jambol, Pleven, Samokov, Marica, Harmanli, Madan ktp. Kiam ĉe ni gastas e-istoj el aliaj loĝlokoj, ni loĝigas ilin en la domoj de niaj membroj — tiel kreiĝas amikaj rilatoj ne nur inter E-societoj, sed ankaŭ inter iliaj membroj.

Ĉe naskiĝtagoj de niaj membroj ni aranĝas celebrojn, sendas gratulleterojn, beleskribitajn.

Efika formo de reteno kaj aktivigo de la junularo estas la ekskursoj — en la lando kaj al eksterlando. En la lando ni ekskursas al vizitindaj historiaj lokoj kaj monumentoj, al la panoramo de Pleven, al pereo-

lokoj de antifaŝistoj-esperantistoj, al aliaj vidindaĵoj. Aparte impresaj estas la vojaĝoj al eksterlando — por partopreni E-aranĝon aŭ laborbrigadon. Ĉiujare ni organizas grupon al la Novjara Semajno en Budapeŝto.

Sed krom amuzaj aranĝoj la societo organizas ankaŭ laborbrigadojn helpe al la vilaĝmastrumo, ĉiam kun amasa partopreno, bona sukceso kaj efika E-propagando. Ofte oni demandas nin, kiel ni povas organizi laborbrigadon, sen esti devigataj. Niaj brigadoj klare parolas pri la entuziasmo kaj alta spirito de nia E-junularo kaj ĝenerale de niaj membroj.

Ĉiujn efektivigitajn aranĝojn ni fiksas per fotoaparato aŭ kinokamerao. Poste oni projekcias la filmetojn antaŭ esperantista kaj neesperantista junularo; tio estas tre efika por reteni junulojn kaj varbi novajn.

La estraro de la societo klopodas tiel organizi ĉiun aranĝon, ke ĉio estu interesa kaj mobiliza por ĉiuj. Al niaj kulturamasaj aranĝoj ni iam invitas ankaŭ neesperantistojn, tiel ni gajnas novajn homojn por la Movado.

Laŭ mi, por reteni la junularon, Bulgara E-Junularo (BEJ) devas:

1. Organizi aranĝojn, kiuj variigas la vivon de la junaj e-istoj: regionajn balojn, renkontiĝojn kaj konferencojn, tutlandajn festivalojn, internaciajn laborbrigadojn, kursojn, tendarojn, ekskursojn ks.
2. Organizi korespondservon.
3. La distingiĝintaj junularaj societoj, grupoj kaj apartaj junuloj estu honorataj per specialaj insignoj kaj memoraĵoj.
4. Eldoni bultenon pri la vivo kaj agado de junularaj E-societoj kaj grupoj.
5. Organizi produktadon de filmoj kun junulara temaro.

Por ke la societaj estraroj povu reteni la junularon, ni rekomendas al ili:

1. Trovi individuan alpaŝon al ĉiu junulo.
2. Efektivigi ofte interesajn por la junularo aranĝojn: balojn, vesperamuzojn kun belartaj programoj kaj dancoj, renkontiĝojn (inter du aŭ pluraj E-societoj), celebrojn de naskiĝ- kaj nomtagoj, kolektivajn promenadojn kaj ekskursetojn, kolektivajn vizitojn de kino aŭ teatro ktp.
3. Al pli grandaj aranĝoj inviti gastojn el alilokaj E-societoj.
4. Organizi ekskursojn tra la lando kaj al eksterlando.
5. Al ĉiu aranĝo oni donu laŭeble pli grandan solenecon. Ĉio, kion la e-istoj iniciatas, devas esti altnivela. Tio kreas por ili aŭtoritaton, igas la tutan socion — kaj ordinarajn civitanojn, kaj gvidantojn — estimi kaj helpi ilin.
6. Oni neniam laboru izolite, sed ĉiam kune kun la aliaj amasaj organizaĵoj, unualoke kun Komsomolo.
7. Oni nepre trovu konvenan ejon por la kolektiĝoj de la junuloj. Se ne estas bona propra klubejo, oni serĉu la helpon de la urba komitato de Komsomolo por ricevi ejon en junulara domo aŭ aliloke.
8. Ĉiu aranĝo estu fiksita per fotilo aŭ kinokamerao.
9. Oni premiu la distingiĝintajn en la agado junulojn.
10. La societoj interŝanĝu informojn pri sia agado.

Ni apelacias: tiu, kiu laboras por sukcesigo de aparta aranĝo aŭ tutece partoprenas la E-agadon, ne serĉu por tio personan profiton! Pura idealismo kaj nobleco devas ornami la agadon de la juna esperantisto, de ĉiu esperantisto!

## LANDA STUDENTA RENKONTIĜO

La 2—3an de dec. 1978 en la Junulara Domo „Liljana Dimitrova“ — Sofio okazis Landa Studenta Renkontiĝo, kiun partoprenis ĉ. 170 studentoj kaj gastoj-lernantoj.

Dum la interkona vespero oni gaje amuziĝis kaj satdancis, ankaŭ partoprenis kvizon („viktorinon“) pri la historio de la E-movado kaj provis sian ŝancon en tombolo.

En la labora parto de la renkontiĝo oni aŭdis: prelegon de Mariana Elenova je temo „Kion donas E-o al la junularo“; raporton de Evgeni Georgiev pri la 34a Internacia Junulara E-Kongreso; informon de Dimitro Papazov — la prezidanto de BEJ, pri la okazontaj en 1979 j. junularaj E-renkontiĝoj en eksterlando. Lasta punkto de la tagordo: interŝanĝo de opinioj kaj spertoj el la junulara E-agado.

Post projekciado de filmo pri la 34a IJEK kaj komuna foto la partoprenantoj disiris. En la salono restis nur la Komitato de BEJ por pridiskuti demandojn pri nia estonta E-laboro.

**Mariana Elenova**

## *VII STUDENTA INTERLINGVISTIKA SEMINARIO*

*25—28 de aprilo 1979, Varsovio*

Organizas: Studenta Interlingvistika Rondo ĉe la Altlerneja Konsilio de la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj, str. Krakowskie Przedmieśćie 24, 00325 Varsovio.

Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri lingvistika traktado de Esperanto kaj aliaj planlingvoj kaj deziras partopreni la seminarion, povas ricevi pliajn detalojn je la supra adreso.

## *NIA PREZIDANTO*



Junulo kiel junulo. Preslaboristo. Sed se oni proksimiĝos al li aŭ ĉeestos niajn regulajn kunvenojn en la Junulara Domo „L. Dimitrova" en Sofio, kies konstanta organizanto estas Ivan, oni eksentos, ke li estas el tiuj homoj, kiuj tutece donis sin al nia nobla humana ideo.

Ne ekzistas Esperanto-aranĝo, kiun li ne suferis, kiu ne pasis tra lia koro. Ni malofte starigas antaŭ ni la demandon, kun kiom da teknika preparo kaj „kurado" estas ligita unu renkontiĝo, prelego, diskoteko, sed ĉiam ni scias, ke la ŝarĝon de la organizado portas li, Vanjo[1]. Tiel la junaj esperantistoj nomas la prezidanton de sia Esperanto-societo Ivan Vojnov.

Unu el la plej valoraj kvalitoj de Vanjo estas lia scipovo altiri novajn amikojn de nia afero. Ja vera esperantisto estas nur tiu, kiu scias kiamaniere altiri novajn adeptojn de la Internacia Lingvo.

La bonaj rezultoj en la laboro de Vanjo ŝuldiĝas eble al lia kapablo organizi kaj distribui la taskojn, apogi sin je vasta kolektivo, ĉar la esperantisto ne povas ekzisti sola — li ĉiam estas inter la aliaj.

Niaj esperantistaj koroj ankoraŭ pulsas kun la ritmo de la tagoj, pasigitaj en Târnovo. Vanjo estis ne nur kasisto de la 34-a Internacia Junulara E-Kongreso. Li tagnokte deĵoris (akceptadis gastojn), distribuis ilin en loĝejoj. En Varno liaj kongresaj okupoj daŭris laŭ la sama ritmo.

Kaj dum ekskursoj en lia teko ĉiam estas la vitra okulo de la fotilo. Ĝi memorfiksas la agrablajn minutojn, pasigitajn inter samideanoj.

Tia estas nia Vanjo — malbrua, ŝajne trankvila, sed ĉiam kun vigla sento pri humuro, laborama kaj tre honesta.

**Maria Jankova, Ivan Ĉulev**

[1] En bulgara lingvo Vanjo estas karesa formo de Ivan, respondanta al Ivanĉjo, Ivĉjo.

---

***TRE GRAVA!***

*Karaj junaj amikoj,*

La poezio estas tiu ĉarma universo, kiu plej ofte estas vizitata de la junaj homoj. En la versoj ili trovas siajn revojn, troviĝas sub la magia potenco de belaj sentoj kaj animstatoj.

Nia lingvo Esperanto estas sonora kaj tre melodia. Per ĝi oni ne nur interkomunikiĝas, sed ankaŭ esprimas abstraktajn nociojn, inter kiuj ankaŭ la vorton „amo". Ĝia klarigado kaj interpretado havas multajn aspektojn — amo al patrolando, al patrina vizaĝo, al la okuloj de kara knabino. . .

Ni klopodu esprimi tiun grandan homan senton per la poeziaj rimedoj de la Internacia Lingvo.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto" anoncas konkurson por plej sukcesa traduko de versaĵo, verkita de la amata al la juna bulgara generacio poeto Pavel Matev.

Zorgu, ke viaj tradukoj ne venu en la redakcion pli malfrue ol la 31a de marto 1979. En la maja numero la redakcio konigos la premiitojn kaj aperigos la plej bonan tradukon.

И да стихнат големите страсти,
и да легна под земен покров —
ще си взема за спомен и щастие
неспокойната дума любов.

Неспокойния образ ще взема,
две големи и плахи очи —
две заглавия на поема,
дето твоето име звучи.

Едно Черно море — да ме носи,
една чайка над мен да кръжи
и тракийските коловози —
да ме водят при вити лози.

Един тръпен завой на Марица,
една южна, печална звезда;
една сянка от бор и елица;
един извор със снежна вода.

Един бял лист, на който ще пиша
със един неумиращ копнеж.
И две сълзи — които ти скритом
на прощаване ще ми дадеш.

Kredeble inter vi, junaj amikoj, estas talentuloj, kiuj verkas en Esperanto. En la paĝo de „Juna esperantisto" ili ĉiam trovos sian lokon. Do: sendu viajn verkojn!

*Lige kun la 76-jariĝo*
*de Asen Grigorov*

## *GASTE AL E-VETERANO*

Antaŭ kelka tempo grupo da blindaj esperantistoj invitis min viziti kun ili ilian unuan Esperanto-instruiston, kamaradon Asen Grigorov. Mi volonte akceptis la inviton, ĉar mi ege estimas lin — li certagrade estas ankaŭ mia E-instruisto. Parencaj mi sentas ankaŭ la blindajn esperantistojn, kelkaj el kiuj kuraĝigis kaj multe helpis mian malfeliĉan fratinon, kiam ŝi perdis sian vidkapablon.

La ĝojo de la jam 75-jara E-veterano ĉe la renkontiĝo kun liaj iamaj gelernantoj estis evidenta. Li kun kortuŝo akceptis iliajn donacojn, prezentitajn kun la vortoj: „Al nia instruisto — kun amo!" Tio estis ĵus produktita gramofondisko kun de li tradukitaj en Esperanton kantoj kaj mola dormkovrilo, kiu varmigu lian korpon, kiel liaj zorgoj varmigis la korojn de la blindaj infanoj. . .

La grupo okupis lokon en la pura, varma sidoĉambro. Kun forta emocio mi observis la vigligitajn, ĝojplenajn vizaĝojn de la blinduloj, turnitajn al ilia instruisto. Ili esprimis amon, ĝojon, respekton. La iamaj infanoj jam estis solidaj virinoj kaj arĝentharaj viroj, sed por ili la estimata instruisto restis la sama — juna amiko, kiu krom al servo de Esperanto dediĉis multajn jarojn ankaŭ al alia nobla celo: enporti lumon kaj ĝojon en la animojn de la infanoj, senigitaj de la suna lumo.

K-do Grigorov demandis pri iuj el la forestantaj ekslernantoj. Evidentiĝis, ke multaj el ili jam forpasis. Ĉe tio lia vizaĝo malsereniĝis, sed li diris:

— Ni ĉiuj forpasos. Grave estas nur kiel ni pasigos nian vivon!

Komenciĝis pluvo da demandoj:

— Kamarado Grigorov, ĉu vi memoras, kiam vi antaŭ pli ol duonjarcento por la unua fojo venis en nian lernejon?. . .

Jes, li ĉion memoras! Kaj tra iliaj ekscititaj demandoj ankaŭ mi vidas ilin en la fora tempo. Jen la 9-jara Elka, kies koreto tremas pro deziro lerni Esperanton.

— Sed vi estas tro malgranda! — oni diris al ŝi.

— Ne gravas, mi elkreskos! — respondas ŝi. Kaj nun kun rido aldonas: — Kamarado Grigorov, mi plenumis mian promeson. Tiam mi estis duonhomo, sed nun, esperantistino, mi jam estas homo kaj duono, ĉu ne?

Ĉiuj gaje ridas.

Kirĉjo (Kiril Manov) rememoras:

— Mi tiam estis 14-jara, sed tre malalta, kaj mi levis min sur la piedfingroj, por aspekti pli alta!

En la grupo estas Todor Ŝoŝev — nun direktoro de sociala agado kaj konstruado de produktiloj—tiam silentema knabo. Jam en tiu tempo li faris provojn verki poezion. Poste li vere fariĝis E-poeto.

Ĉeestas ankaŭ Mihajlo Karamihajlov — la direktisto de la fama Ĥoro de Blinduloj, konsistanta plejparte el esperantistoj. Parolante kun k-do Grigorov, li nevole leviĝas de la seĝo, kio atestas pri lia ĝis nun konservita alta respekto.

Jen la ĉarma Tanja, kiu diligente skribas brajle por siaj samsortuloj, jen la laborema Sultanka — belvoĉa solistino de la ĥoro. . .

Ĉiuj parolas bonege en Esperanto, disputas, starigas al sia instruisto lingvajn demandojn, kiuj hezitigus ankaŭ bonan esperantiston.

Iu petas:

— Kamarado Grigorov, rakontu al ni pri samideano ADA!

Kaj k-do Grigorov volonte ekrakontas pri tiu fizike kaj mense vigla 85-jara ve-

terano, el kies lernolibroj pluraj generacioj lernis Esperanton kaj kiu eĉ nun aktivas en la E-movado.

— Kamarado Grigorov, rakontu al ni pri la tempo, kiam vi estis sekretario de kamarado Georgi Dimitrov!

Modeste, elokvente, kvazaŭ temus pri io tute natura, la maljuna veterano rakontas pri tiu periodo de sia vivo dum la unuaj postmilitaj jaroj. Kaj antaŭ la interna rigardo de la ravitaj aŭskultantoj leviĝas la glora heroo de la Lajpciga Proceso — senkompromisa komunisto, talenta organizanto de la bulgara kaj monda proletaro, akrevida ŝtatisto kaj komplezema homo. . .

— Kaj kia estis lia rilato al Esperanto? — iu deziras scii.

— Favora! Li nomis Esperanton unu el la efikaj rimedoj por konigi al la ekstera mondo la veron pri nia patrolando post la liberiĝo el sub la faŝismo, pri la sukcesoj de la bulgara popolo en la konstruado de nova socio en nia lando. . .

El la konversacio evidentiĝas, kiom grava estas Esperanto en la vivo de blinduloj. Per korespondado kun alilandaj samsortanoj, per legado de libroj kaj gazetoj ili plialtigas sian ĝeneralan kulturon. Multaj el ili kantas en la renoma Ĥoro de Blinduloj kantojn, kies tekstojn ordinare k-do Grigorov tradukis en Esperanton; ili partoprenas en universalaj kongresoj kaj aliaj internaciaj aranĝoj. Malavaraj amikoj-esperantistoj testamentis al la blinduloj du konstruaĵojn, kiujn ili bone utiligas por kontentigo de siaj socialaj bezonoj.

— Karaj amikoj, mi fieras pri vi! Mi fieras pri via talento, pri via aktiveco, pri via bonega kono kaj uzo de nia lingvo. Parolu inter vi ĉiam en Esperanto! Eĉ se foje vi ne scias iun vorton, diru ĝin bulgarlingve, aliaj helpos! Alikaze, ne praktikante la lingvon, vi forgesos ĝin — kaj tio ne devas okazi!

Post tiuj vortoj la kara dommastro regalas nin per bongusta kuko kaj senalkoholaĵoj — agrabla fino de tiu neforgesebla vespero.

Ni adiaŭas, portante en la koroj amon kaj estimon al tiu sindediĉa homo, kiu dum sia tuta vivo tiom multe kontribuis por la esperantistaro per siaj poeziaĵoj, lernolibroj, vortaroj, per la establo kaj multjara gvidado de la Sofia Literatura Esperanto-Rondo — trafa formo por malkovro kaj impulsado de E-verkemuloj; li eĉ nun anstataŭ ripozi partoprenas la redaktadon de granda verko — plena Bulgara-Esperanta Vortaro. . .

**Rajna Konstantinova**

## HEROA PASINTECO

*Straŝimir Milanov*

## *LA FILINO SEKVAS LA VOJON DE LA PATRO*

1920 jaro. Ĉe la partia organizaĵo en vilaĝo Palatica (nuna Kamburovo), distrikto de Târgovişte, kreiĝas junulara grupo sub la gvido de la popola instruisto Dimitro Kamburov.

1942 jaro. La junulara grupo en Palatica fariĝas grupo de RMS[1]. En ĝiajn vicojn eniras ankaŭ la pli aĝa filino de Kamburov — Anka, lernantino en la gimnazio de Târgovişte.

Novembro 1942 j. En nelegala partia renkontigo en la najbara vilaĝo Kjosevci kiel sekretario de la Regiona Komitato de la Bulgara Laborista Partio (komunistoj) en Omurtag estis elektita Dimitro Kamburov. Sekvante la revolucian vojon de sia patro, la filino Anka fariĝas membro de la Regiona Komitato de RMS en la tiama regiono de Omurtag.

12 de septembro 1943. Komenciĝas la heroa kroniko de la partizana taĉmento de Omurtag. Por politika komisaro de la taĉmento estas elektita Dimitro Kamburov. Dekon da tagoj post la apero de la taĉmento en v. Halvaĝijsko ĝi dividiĝas je du trupojn: Trupo de Tuzluk (kun perimetro de agado ĉirkaŭ la nuna urbo Antonovo) kaj Trupo Balkana (kun perimetro sudokcidente de urbo Omurtag, en la piedoj de montopinto Lisec). En tiu ci lasta trupo kune kun sia patro estas ankaŭ Anka.

26 de januaro 1944. „. . .ĉe vesperiĝo estis malkaŝitaj kelkaj partizanoj restintaj el la Trupo de Omurtag,

[1] RMS — Laborista Junulara Unuiĝo (junkomunista) en Bulgario ĝis 1944 j.



nura en la momento, kiam ili direktiĝis al sia terkabano, situanta ĉe la limo inter la regionoj de Elena kaj Omurtag. Soldatoj kaj policanoj komencas pafi kontraŭ la partizanoj kaj sukcesas mortigi tri el ili: Dimitro Ĥristov Kamburov, centra lernejestro en v. Palatica, regiono de Omur-



tag. . ." (El la raporto de la regiona policestro al la Direkcio de la Polico en Sofio, la 27-an de januaro 1944).

29 de januaro 1944. „Mi raportas al vi, ke la 29an de januaro posttagmeze, en la Balkano de u. Elena, proksime al v. Kalniŝte, regiono de Elena, post obstina persekutado fare de polico kaj armetrupo, estis malkaŝita grupo de 5 eksterleĝuloj. . . En la komenciĝinta pafbatalo estis neniigita la tuta grupo. . . La mortigitoj estas: . . . Anka Dimitrova Kamburova, filino de Dimitro Kamburov. . ." (El la policaj bultenoj de la provincestro al la Direkcio de la Polico en Sofio, la 31an de januaro 1944).

Tio estas nur kelkaj ĵalonoj el la heroa revolucia vojo, kiun la patro kaj la filino gepartizanoj trairis, batalante kun pafiloj en la manoj kontraŭ la faŝistoj.

Post la liberiĝo (9. IX. 1944 j.) la danka bulgara popolo donis al vilaĝo Palatica la nomon Kamburovo.

Ili — patro kaj filino — estis puraj, honestaj homoj.

Ili estis fidelaj filo kaj filino de la liberama bulgara popolo.

Ili estis kuraĝaj batalantoj por libero kaj socia justeco por la popolo.

Kaj ankoraŭ: ili estis ardaj esperantistoj. Esperantistoj-partizanoj. Patro kaj filino.

. . .Kun arkitekto Ivanka Kamburova kaj doktorino Milanka Despotova ni rememoras pri nia kunlernantino Anka Kamburova.

. . . Antaŭ ol kapti la armilon en la manojn Anka uzis la armilon de la revolucia propagando kaj agitado por la justa afero de RMS kaj la Partio.

— Mi rememoras nian komunan RMS-laboron kun Anka, — diras kun emociiĝo d-rino Despotova. — Ŝi kun neelĉerpebla entuziasmo altiradis nin al la tiamaj formoj de revolucia agado inter la junularo kaj lernantaro en la gimnazio de Târgoviŝte kaj ĝia filio en Omurtag. Obstine ŝi

gajnis la junajn homojn por la abstinula, turisma kaj stenografa societoj, por lerni Esperanton — individue kaj kolektive, surbaze de RMS-kvaropoj. Per grandaj klopodoj ŝi sukcesadis havigi al ni lernolibrojn de Esperanto, evidente kun la helpo de sia patro. . .

— Jes, mi rememoras, ke en iu septembra posttagmezo de 1942 jaro en Omurtag mi estis kun Despotova. Anka renkontis nin surstrate kaj donis al mi lernolibron de Esperanto, oibeneru lyfota!

kaj mi donis al ŝi mian fotoaparaton por la bezonoj de RMS.

— Anka havis ardan karakteron. Ŝia koro estis plena je noblaj streboj. Ŝi ĉiam estis preta batali por la socia justeco. Korpe kaj anime ŝi apartenis al la batalo por popola libero kaj feliĉo.

— Jam forpasas tridek kvin jaroj, sed mi ĉiam vidas ŝin antaŭ mi kiel vivan. Ja ni sidis sur sama benko. Tian ĉarman homon oni neniam povas forgesi. . .

## *Lige kun la 60-jariĝo de Belorusa SSR*

*Valerij Ŝiŝko*

### BELORUSA SSR EN LA SOVETA-BULGARA KUNLABORO

En januaro 1979 la belorusa popolo havas grandan feston: antaŭ 60 jaroj, la 1-an de jan. 1919, estis proklamita la Belorusa Soveta Socialisma Respubliko. Post kelkcentjara subpremado la belorusoj akiris ŝtatan sendependecon.

Iama povra provinco de Cara Rusio, Belorusio estas nun altevoluinta socialisma respubliko. Iama fonto nur de krudmaterialoj kaj nutraĵoj, la Belorusa SSR okupas nun gvidan lokon ĉe produktado de traktoroj, ŝarĝaŭtoj, komputiloj, horloĝoj, kemiaj fibroj, maŝinoj kaj aliaj industriaj produkdaĵoj. Iam subpremata nacia provinco de la Rusa Imperio, kie estis malpermesita la nacia lingvo kaj la loĝantaro estis 90-procente analfabeta, Belorusio nun havas propran sciencan akademion, 31 superajn lernejojn (inter ili tri universitatojn), naciajn kulturajn instituciojn.

Malgraŭ grandegaj perdoj dum la Dua Mondmilito (la plej terura estas la pereo de ĉiu kvara civitano) Belorusio dank' al la helpo de la tuta soveta popolo renaskiĝis kiel Fenikso. Membro de UNO, la Belorusa SSR havas politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn rilatojn kun multaj ŝtatoj de la mondo. La plej firmajn ligojn la respubliko havas kun la socialismaj landoj, do ankaŭ kun Popola Respubliko Bulgario. Pri la partopreno de Belorusioa en la soveta-bulgara kunlaboro rakontas la suba artikolo.

Post la Dua Mondmilito komenciĝis nova etapo en la rilatoj inter Sovetunio kaj Bulgario. La nunaj rilatoj baziĝas sur sama sociekonomia ordo kaj sur sekvantaj el tio similaj celoj en la interna kaj ekstera politiko de ambaŭ ŝtatoj.

En la plivastigo de la diversflankaj ligoj inter Sovetunio kaj Bulgario notinde kontribuas la belorusa popolo, la partiaj, ŝtataj kaj sociaj organizoj de la Belorusa SSR. En nia respubliko oni faras multon por konigi al la civitanoj la historion kaj kulturon de la bulgara popolo, la tradiciojn de la soveta-bulgara amikeco. Ĉiujare la 9an de septembro[1] okazas solenaj kunvenoj en la ĉefurbo Minsk kaj en provincaj urboj kaj vilaĝoj. En 1978 estis vaste festita la 100-jara datreveno de la liberiĝo de Bulgario el otomana jugo.

En 1961 fondiĝis Belorusa Filio de la societo de Soveta-Bulgara Amikeco, kiu nun havas ligojn kun II distriktaj kaj urbaj bulgaraj komitatoj de la bulgaraa soveta amikeco. Tre fruktodona estas la kunlaboro inter la ĝemelaj distrikto Gabrovo kaj provinco Mogilev, inter la urboj Sevlievo kaj Bobrujsk, Drjanovo kaj Biĥov, Trjavna kaj Osipoviĉi. En la 70-aj jaroj la sferon de amikaj kontaktoj eniris uzinoj, agrikulturaj kooperativoj, sciencaj. kulturaj, junularaj kaj aliaj organizoj.

La Belorusa SSR aktive partoprenas en la realigo de la komercaj kontraktoj inter Sovetunio kaj Bulgario. Ĉirkaŭ 90 belorusaj entreprenoj plenumis mendojn de Popola Respublko Bulgario. Nia respubliko liveras al siaj partneroj metaltranĉajn maŝinojn, grandkapacitajn ŝarĝaŭtojn „MAZ“ kaj „BeLAZ“. La bulgaraj kooperativanoj uzas la universalajn radotraktorojn „Belarus“, kiuj havas altajn teknikajn kvalitojn. En Bulgario la maŝinoj de Minska Traktora Uzino estas

---

[1] 9 de septembro 1944 — tago de liberiĝo de Bulgario el la faŝismo, kiu fariĝis nacia festo de la bulgara popolo.

tre popularaj. Ili ludis gravan rolon ĉe kooperigo de la individuaj farmoj.

La uzino liveras ankaŭ detalojn por traktoroj, „Bolgar", kies prototipo estas „Belarus".

En kalkulcentroj de grandaj industriaj kombinatoj, en la Bulgara Komitato de Scienco kaj Tekniko k.a. funkcias elektronaj komputiloj, produktitaj en la belorusa ĉefurbo. Bulgario estas konsumanto ankaŭ de aliaj belarusaj varoj: linaĵoj, vitraĵoj, lignomaterialoj, televidiloj, fotiloj, horloĝoj ktp.

Sovetunio estas ne nur eksportanto, sed ankaŭ grava importanto de bulgaraj varoj. Multaj el tiuj estas bone konataj en nia respubliko. Inter ili estas elektroĉaroj, akumulatoroj, kompleta ilaro por fabrikoj de nutraĵoj, en la agrikulturo oni uzas falĉ- kaj draŝmaŝinojn, semilojn, ilaron por furaĝo. Pli kaj pli rimarkeblan lokon okupas la importo de la kemia kaj metalurgia branĉoj de la bulgara industrio: pneŭmatikoj, polietileno, ŝtaltuboj. En niaj vendejoj oni povas aĉeti vinberojn, fruktojn, legomojn, konservaĵojn, vinojn, tabakaĵojn ka. produktaĵojn el Bulgario. Popularaj estas ankaŭ mebloj, teksaĵa kaj leda galanterio, kosmetikaj kaj farmaciaj varoj.

Menciindas, ke Belorusa SSR kaj Popola Respubliko Bulgario kunlaboras enkadre de la Kompleksa Programo de Socialisma Ekonomia Integriĝo. Ekzemplo de tiu kunlaboro estas la projektado kaj produktado de elektronaj komputiloj. Laŭ interkonsento en la jaro 1969 specialistoj de kelkaj socialismaj landoj projektis kaj ekproduktis ses modelojn de modernaj komputiloj ES. Modelo ES-1020 estas rezulto de streĉa komuna laboro de belorusaj kaj bulgaraj sciencistoj kaj teknikistoj. Ekde 1973 la modelo estas serie produktata en ambaŭ landoj surbaze de kooperado inter uzinoj bulgaraj (Stara Zagora, Ruse, Plovdiv, Sofio) kaj belorusaj (Brest, Minsk). La spertoj de la kunlaboro estis utilaj ĉe projektado de pli moderna modelo ES-1035, produktata ekde 1976. La Esplor-Scienca Instituto de Komputiloj (Minsk) kaj la Centra Instituto de Kalkuliloj (Sofio) daŭrigas kunlaboron en la kampo de projektado de elektronaj kalkulmaŝinoj.

La belorusa popolo multe kontribuas al la soveta-bulgara kultura kunlaboro. La kelkjarcentaj kulturaj interligoj, kiuj baziĝas sur la parenceco de niaj slavaj nacioj, fariĝas pli kaj pli fortaj dum la lastaj jardekoj. En la Belorusa SSR post la Dua Mondmilito estis eldonitaj ĉirkaŭ 30 libroj de bulgaraj aŭtoroj. Plej aktive agadas la tradukistoj de bulgara poezio. Kiel ekzemplo mencieblas antologioj: de nuntempa poezio „De sur krutaĵoj balkanaj" (1965) kaj de klasika poezio „Ekbrilu la tago" (1973). Ambaŭ eldonaĵoj estis grava evento en la kultura vivo de Belorusio. La iniciatinto kaj ĉefa tradukisto de ambaŭ antologioj, la poeto Nil Hileviĉ, estis dekorita per la ordeno „Kiril kaj Metodij" — I grado.

Bulgaraj temoj okupas rimarkeblan lokon en verkoj de belorusaj aŭtoroj. Poemoj de N. Hileviĉ, P. Brouka, M. Tank, noveloj de K. Kireenka, B. Saĉanka, vojaĝraportoj de I. Ŝamjakin kaj A. Simuraŭ estas dediĉitaj al la socialisma konstruado en PR Bulgario. La dokumenta novelo de A. Zaharĉenko priskribas la heroan filinon de la bulgara popolo Lilija Karastojanova, kiu batalis kaj pereis kiel partizanino sur la belorusa teritorio. Ŝian nomon portas straro en Minsk. Pri la vivo kaj heroaĵo de L. Karastojanova rakontas la dokumenta filmo de belorusa studio „Lilija, filino de Georgica". La filmo ricevis premion de la 5-a tutsovetia festivalo kaj havis grandan sukcecon en Belorusio, same kiel en Bulgario. En 1975 aperis belorusa-bulgara filmo „Bratuŝka", kies temo estas la frataj interrilatoj de niaj popoloj, la komuna batalo kontraŭ la faŝismo.

La belorusaj spektantoj havas eblon ĝui la bulgaran dramaturgion. La teatro de urbo Vitebsk surscenigis la teatraĵon de Leda Mileva „Kiam la pupoj ne dormas". En pupteatro (Minsk) oni prezentas la spektaklojn „Lepora lernejo" kaj la „Aventuroj de Pin-Pin" de P. Manĉev. La sama teatro ĉi jare preparis spektaklon „La nukseto" de R. Aleksandrova.

La Belorusa SSR ludas certan rolon ĉe realiĝo de la kontraktoj inter Sovetunio kaj Bulgario en la sferoj de scienco kaj klerigo. Multjarajn ligojn kun bulgaraj kolegoj havas sciencistoj de la plej grava institucio — la Scienca Akademio de Belorusio. Ekzemple, la Instituto pri Nuklea Energetiko kunlaboras kun la Fizika Instituto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, la Instituto pri Varmo- kaj Mas transfero — kun la Instituto pri Matematiko kaj Fiziko ĉe BAS. Similajn kontaktojn havas specialistoj pri matematiko, fiziko, kemio, biologio, kibernetiko, medicino. Konstante plivastiĝas la kunlaboro en la sfero de sociosciencoj, antaŭ ĉio inter slavistoj. Belorusaj slavistoj sin okupas pri la bulgara lingvo, literaturo, historio, partoprenas, kune kun bulgaraj kaj alilandaj kolegoj, en kompilado de Komunslava Lingvoatlaso kaj de vortaro de lingvistikaj terminoj de slavaj lingvoj. Sciencistoj el la Akademia Instituto pri Artoj, Etnografio kaj Folkloro esploras la problemon pri etnokulturaj (ankaŭ belorusa-bulgaraj) ligoj de la slavaj popoloj.

Menciindas la kontaktoj inter klerigaj institucioj de Belorusio kaj Bulgario. Tiajn kontaktojn havas profesoroj kaj studentoj de multaj superaj lernejoj: la Veterinara Instituto en Vitebsk kaj la Sofia Veterinara-Medicina Instituto, la instruistaj alt-

lernejoj en Mogilev kaj Gabrovo, la Instruista Instituto en Minsk kaj la Universitato de Veliko Târnovo. En 1966 subskribis kontrakton pri kunlaboro la plej grandaj superaj lernejoj — la Belorusa Universitato „V. I. Lenin" kaj la Sofia Universitato „Kliment Oĥridski". Krom interŝanĝo de profesoroj kaj aspirantoj por prelegi kaj konatiĝi kun la spertoj de kleriga kaj scienca agadoj, regule okazas interŝanĝo de studentoj laŭ senvaluta kvitiĝo. Bulgaraj gejunuloj studas en la Universitato kaj la Politeknika Instituto de Minsk, en la Belorusa Agrikultura Akademio (provinco Mogilev) ka.

Bonajn kontaktojn havas mezlernejoj. Jam delonge amikas geknaboj el minska lernejo № 50 kaj sofia lernejo „I. Vazov". Helpe de bulgaraj korespondantoj estis organizita muzeo pri la bulgara-soveta amikeco en mezlernejo № 114. Ekde 1960 pioniroj de mezlernejo № 1 en urbo Ĉeĉersk (provinco Gomel) korespondas kun samaĝuloj el bulgara urbo Lom. En la lernejo estas ĉambro-muzeo pri Lilija Karastojanova. La pionira organizo portas la nomon de la bulgara heroino.

Amikaj rilatoj ekzistas ankaŭ inter la belorusaj kaj bulgaraj esperantistoj: ili korespondas, gastas unu al alia. Tiuj rilatoj tamen devas fariĝi multe pli ampleksaj kaj fruktodonaj.

Multfaceta kaj bonrezulta estas la partopreno de Belorusa SSR en la soveta-bulgara kunlaboro. La belorusoj, kiel ĉiuj sovetianoj, alte taksas kaj reciprokas la internacian politikon de Popola Respubliko Bulgario, kiu laŭ la vortoj de Todor Ĵivkov, konstruas socialismon „ŝultro ĉe ŝultro kun niaj sovetaj gefratoj, en kondiĉoj de ĉiam pli plena, ĉiam pli organika interproksimiĝo de Popola Respubliko Bulgario kun la granda Unio de la Sovetaj Socialismaj Respublikoj". La kunlaboro inter niaj landoj havas grandan estonton.

## E-RENKONTIĜO EN SALAVAT

La 21an de novembro en la Kulturpalaco de Naftokemiistoj okazis renkontiĝo de la distinguloj el la urbaj mezlernejoj kaj la partoprenantoj en la brigadoj de komunisma laboro kun la Salavata E-Klubo. Ĉeestis ĉ. 400 homoj.

La ano de la klubo A. Lobastov rakontis pri la internacia lingvo E-o, pri la E-movado kaj pri la 63a UK de E-o en Varno, pri tiu miraklo, kiam 4500 homoj el pli ol 50 landoj interparolis sen interpretistoj.

La reprezentanto de SEJM V. Vjazovcev rakontis pri la laboro de la E-klubo, pri la renkontiĝoj, kiujn la klubanoj partoprenis, pri la E-libroj, ĵurnaloj kaj gazetoj, kiujn ili abonos, kaj alvokis la ĉeestantojn al E-kursoj. Ĉe la kulturpalaco jam ekfunkciis tri E-kursoj.

Pri la E-tendaroj, kiujn en 1978 partoprenis la salavatanoj, rakontis G. Lobastova. Somere en USSR okazis du E-tendaroj. Unu distancis je 250 km de Barnaul, la alia — je 60 km de Maĥaĉkala, ambaŭ en pitoreskaj lokoj.

Fine de la renkontiĝo estis donita negranda koncerto en E-o, dum kiu la klubaninoj kantis kaj deklamis.

Kun granda ardo la ĉeestantoj akceptis la prezenton de la Salavata E-Klubo.

**V. Vjazovcev**

## *REVU-17*

Renkontiĝo de e-istoj de Volgo kaj Uralo okazis la 6—8an de nov. 1978 en Kujbiŝev en la turista bazo „Dubki". Partoprenis 78 personoj el 15 urboj.

Okazis: mitingo, dediĉita al la 61a datreveno de la Granda Oktobro, konferenco, prelego „Lenin en Samara", ekskurso tra la urbo, vizito de Muzeo de la Milita Gloro, demonstro de lumbildoj, konkurso de la gajaj kaj la spritaj kaj malgranda bankedo.

Okazis ankaŭ interesa renkontiĝo kun la veterano de E-o de 1912 j. P. Afstafjev, kiu deklamis tradukitan de li versaĵon kaj fragmenton el la fabelo de Jerŝov „Ĉevaleto-Ĝibuleto".

Por nee-istoj estis organizita rakonto pri E-o kaj, kun helpo de gastoj, malgranda koncerto.

**Z. Skvorcova**

## POR VASTA ORGANIZITA E-TURISMO

De la 26a de novembro ĝis la 3a de dec. 1978 en Pollando okazis la 4a Internacia Foiro de la E-Turismo. Ĝin partoprenis organizantoj de E-turismo el Bulgario, Ĉeĥoslovakio (ambaŭ E-asocioj), Finnlando, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando.

La partoprenantoj kunsidis, substrekis interkonsentojn pri reciproka sendeviza interŝanĝo de E-grupoj kaj samtempe vizitis turismajn objektojn: hotelojn, kampadejojn kaj restoraciojn en Varsovio, Bidgoŝĉ, Torun kaj Zakopane, kie povas feriadi E-turistoj.

Dum la foiro okazis estrarkunsidoj de la

*(Sekvas sur p. IV)*

●En majo 1978 ĉe la Akademio de Politikaj Sciencoj de Rumanio fondiĝis scienca esperantologia interlingvistika kolektivo (KEI). Prezidanto de tiu ĉi kolektivo estas prof. d-ro Ignat Bociort (Boĉjort). Krome per ministra dekreto estis kreita principa ebleco instrui en ĉiuj filologiaj fakultatoj.

*Laŭ «Informilo» de Internacia E-Muzeo, 4/1978*

●Fine de septembro 1978 en u. Timiŝoara okazis tutlanda E-renkontiĝo. Partoprenis reprezentantoj el 12 urboj. Estis faritaj: analizo de la ĝisnuna agado, sciencaj komunikoj kaj informoj, literatura kaj arta programo; estis amuzaj momentoj, renkontiĝo kun jugoslavaj e-istoj, granda ekspozicio en la moderna halo de la Universitato, oficiala malfermo de la E-kursoj en la Universitato kaj en aliaj tri superaj institutoj, en la popola universitato kaj en du fabrikoj de la sama urbo.

● Prof. Ignat Bociort parolis kvarfoje komence de la nova lernojaro pri E-o antaŭ la studentaro el Timiŝoara. Li aperigis du intervjuojn en rumana kaj hungarlingva gazetoj, kontaktis oficiale kelkajn urbojn kaj pridiskutis la eblecojn por estigi E-kursojn tie. Granda evento okazis la 5-an de oktobro: oni festis en Timiŝoara (en la Aula Magna de la Universitato) la 90-an datrevenon de naskiĝo de la plej granda rumana lingvisto Iorgu Iordan — honora membro de pluraj sciencaj akademioj. La granda sciencisto, kiu estas ankoraŭ tre aktiva kaj bonfartas, ĉeestis la feston. Ĉeestis kelkcentoj da sciencistoj, universitatanoj, gestudentoj. Post la rektoro de la Universitato kaj post la dekano de la Filologia Fakultato parolis en la nomo de la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio prof. d-ro Bociort, varme, science, impone, esperantlingve! Grandegaj aplaŭdoj! Akademiano Iordan, impresita kaj surprizita, esprimis, samtempe kun la danko, bedaŭron, ke li ne povas respondi esperantlingve. La gazetoj informis pri la afero.

●Doc. d-ro Cezar Apreotesei kontaktis la urbojn Baia Mare, Kluĵ-Napoka, Oradea kaj Braŝov cele de organizado de E-agado. En Baia-Mare li prelegis pri la temo: „Kion oni scias kaj kion oni ne scias pri Esperanto“. Li kontaktis grandnombron da sciencistoj kaj kulturaktivuloj en pluraj urboj, farante „rondvojaĝon“ tra la lando, kaj aperigis lastatempe ĉirkaŭ 15 informojn pri E-agado en Rumanio.

●Universitata asistanto Konstantin Dominte el Bukureŝto kontaktis gravajn personojn en la Rumana Radio-Televido (oni elsendis informojn pri E-o), en la estraro de la informo-servo kaj gazetaro ka. Oni komencis sub lia gvido laboron por Rumana Antologio.

●Prof. Mariana Prada tradukis rumanlingven la laboron de d-ro Tonkin „Esperanto and International Language Problems“ kaj recenzis ĝin en la scienca revuo de la Universitato en Timiŝoara. Ĉi tiu periodaĵo aperigos, ekde la venonta numero, resumojn ankaŭ en E-o. La samo okazos en la scienca periodaĵo de la Centro pri Sociaj Sciencoj de Timiŝoara. La studenta revuo en Timiŝoara havos konstante rubrikon pri Esperanto-movado kaj lingvo.

●KEI komencis grandan laboron por aperigi E-lernolibron kaj vortarojn.

●Oni iniciatis kontaktojn por estigi rumanan E-gazetaran servon kaj rumanan sekcion de ILEI. Bone sukcesis la iniciataj kontaktoj kun MEM kaj TEJO.

*(Sekvas sur p. III)*

---

## Letero de amiko

*Maracaibo, la 16an de nov. 1978*

*Al Bulgara E-Asocio p. к. 66, Sofio, Bulgario*

Karaj samideanoj,

Mi dankas al vi pro via tre afabla letero, esperantlingvaj libroj kaj revuo „Bulgara Esperantisto“. Ĉio estas utila por mia instruado de la Internacia Lingvo en nia urbo Maracaibo (prononcu: Ma-ra-kaj-bo).

Kun plezuro mi skribas ĉi tiun leteron al vi kaj mi deziras sanon kaj prosperon al ĉiuj esperantistoj en Bulgario.

Mi estas venezuela junulo, kiu laboras kiel instruisto. Ekde septembro okazas E-kurso en la loka Blindula Asocio. Mi gvidas senpage tiun kurson. La kursanoj estas ĉefe malriĉaj junuloj. Mi gvidas kurson ankaŭ por malgranda grupo de blinduloj. Kompreneble, ĉiuj kursanoj deziras perfektiĝi en la Internacia Lingvo, tamen ili sentas gravan mankon de E-materialoj. Kun kora danko ni akceptos: librojn, vortarojn, revuojn, kasetojn ktp. Ĉio en Esperanto. Ĉu vi povas sendi al ni — senpage aŭ je malaltaj prezoj — tiajn materialojn? Mia adreso estas: David G. Valecillos V., Calle 79, n-ro 3 C-72, Maracaibo, Venezuela.

Mi deziras lerni la bulgaran lingvon. Ĉu vi povas sendi al mi librojn pri memlernado de tiu slava lingvo?

Al ĉiuj anticipan koran dankon!

Samideane salutas vin

*D. Valecillos V.*

# Verdaj steletoj

## NEĜOVIRO

— Bona paĉjo, faru
neĝoviron ni,
kaj en korto staru
forta, granda ĝi.

El karoto — nazo,
barbo — stupofask',
kaj latuna vazo
estu ĝia kask'.

Ni la neĝoviron
armu per pafil'!
— Tiun ĉi deziron
ni ne havu, fil'!

Kial do pafilon
nepre donu ni?
Donu balailon,
kaj laboru ĝi!

*Elvira Lippe*

## PAĈJO, PANJO, MI KAJ LA TAMBURO

Mia panjo, mia kara,
ŝi ja estas malavara.
Jen: post kiam mi ŝin petis,
tambureton ŝi aĉetis!

Mi en ĉambro, mi en korto
frapas ĝin per tuta forto.
Sed riproĉas, aj teruro! —
paĉjo panjon pro l'tamburo:

— Min la knab' dum ĉiu horo
tro malhelpas ĉe laboro!

— Trankviliĝu, ne plu ĝenos
vin la knabo. . . Li nur prenos
la tamburon kaj ĝin tuŝos,
kiam vi ripoze kuŝos!

## *PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ, NASKITAJ EN JANUARO*

La kapitalismo en Usons atingis sian plej altan disvolviĝon kaj sufokis sian naskinton — la personan liberecon.

*El «Ĝis Ĉikago kaj returne»*

— Kiun malvirton vi plej multe malamas?
— La avarecon.

**Aleko Konstantinov (1. I. 1863 — 11.V. 1897)**

La virino devas esti bela; kiam ŝi ne estas tia, la kialo estas nur en ŝia nescipovo.

La koro ne atendas motivojn, ĝi mem ilin kreas.

**Pejo Javorov (1. I. 1877 — 16. X. 1914)**

Memoru bone tion: se vi estas preta morti — senmorta vi estas.

La senvoleco estas rusto de la karaktero.

Vorto ne ellasita — sklavo nia; vorto ellasita — malamiko nia!

**Stojan Miĥajlovski (7. I. 1856 — 3. VIII. 1927)**

Instituto, restinta de la pasinteco kaj delonge likvidita de la historio — tio estas la eklezio.

**Geo Milev (15. I. 1895 — 25. V. 1925)**

Por ke la homo estu homo, li devas respekti la rajton de alia homo.

Kiel la popola, tiel ankaŭ la homa libereco ne estas akirata, sed prenata perforte.

La interfratiĝo de la popoloj estas morto por la tiranoj.

**Ljuben Karavelov (. . . 1834 — 21. I. 1879)**

*Elektis kaj tradukis:* Stojan Kostadinov

---

*(El p. 16)*

● En la urbeto Beliu de distrikto Arad licea prof. Emil Lâzureanu malfermis denove la E-kurson por la partoprenantoj de la pasinta jaro. Temas pri 96 entuziasmaj kursanoj de ĉi tiu grandmerita kaj prestiĝplena profesoro, juna kaj tre kapabla. Sen vortaroj, kun improvizita lernolibro, helpe de kelkaj E-revuoj oni faras tie imponan laboron. Estus konvene, se e-istoj el diversaj landoj sendus al ili bildkartojn aŭ aliajn esperantaĵojn. La adreso: prof. Emil Lâzureanu, scoala generalâ BELIU, judetul Arad, cod 2856, Rumanio.

*Doc. d-ro Cezar Apreotesei*

## *MIA KANTO*

Tekusto: *Asen Grigorov*

Muziko: *Dimitro Denĉev*




Mi ne kantas pri steloj, kaj amo kaj rozoj  
kun mistera, tenera amar',  
ja ni vivas tempeste en temp' grandioza —  
mi trumpetas per kupra fanfar'.

Nun la korsentimentoj formortas velkante  
en la tagoj de sanga batal'.  
Mi galopas antaŭen kaj vokas flamkante  
kaj alarmas per fajra signal'.

Mi forgesas prikanti la mildajn animojn  
kaj sopiri, kaj plori per larm'.  
Mia kanto funebras la karajn viktimojn,  
sed samtempe tamburas: alarm'!

Ho! Ni estas milionoj, kaj niaj armiloj  
ne nur estas el ŝtalo kaj fer'!  
Ni batalas per glavoj ankoraŭ pli brilaj:  
per justeco, per lumo kaj ver'!

Kaj en tiu ĉi tempo unike majesta  
mia kant' estas kupra fanfar',  
kiu vekas kaj vokas per voĉo tempesta:  
al batalo, vi granda homar'!

*Sofio, 1934*

---

*(El paĝo 15)*
asocio Monda Turismo. Ili ankaŭ estis tre sukcesaj. Oni redaktis la Internacian Turisman E-kalendaron 1979. Estis pridiskutitaj la funkciado de la buslinio „Esperanto" inter Hungario kaj Pollando kaj kombinita aviadila-busa linio„ Esperanto" inter Bulgario kaj Pollando. Tiuj linioj jam kelkajn jarojn funkcias dum la somero.

Por progresigo de la organizita E-turismo estas necesaj E-lerniloj por turistoj. Estis decidite, ke Monda Turismo urĝe aperigu malgrandan, ilustritan, praktikan lernolibron por turistoj. La estraro de MT apogos la kompiladon de similspecaj lernolibroj.

Grava faktoro por rapida evoluo de la E-turismo kaj por disvastigo de nia lingvo estos la ĵus konstruita moderna, kvinetaĝa, propra Internacia Esperanto-Kursejo de la Distrikta Estraro de BEA en Pisanica apud urbo Smoljan (Bulgario).

Estis anoncite, ke en Pollando kaj en Slovakio, laŭ peto de la landaj E-asocioj, la respektivaj ŝtataj instancoj konsentis transdoni al la e-istoj malnovajn grandajn konstruaĵojn, kiujn ili renovigos per ŝtata subvencio por esti utiligataj por asociaj celoj, ĉefe por lernado kaj aplikado de E-o kaj turismo.

En 1979 j. Monda Turismo kompilos „Gvidlibron de la E-Turismo", kiu enhavos ĉiujn necesajn informojn, sugestojn, konsilojn, liston de la konstantaj turismaj E-aranĝoj ka. La libro estos riĉe ilustrita. Gin devas havi ĉiu vojaĝema samideano kaj ĉiu, kiu emas ĉiĉeroni al eksterlandaj e-istoj.

Iom post iom ne nur ordinaraj e-istoj sed ankaŭ E-gvidantoj komprenas la valoron de la organizita E-turismo por nia Movado. Tio estas la temo de la kunveno de MT en Lucerno enkadre de la 64-a UK de E-o.

En 1979 j. Monda Turismo aperigos diversajn modernajn kaj efikajn propagandilojn pri aplikado de E-o en la turismo.

La internacia turismo estas vasta kaj tre fekunda tereno por disvastigo kaj aplikado de nia lingvo. Ju pli da e-istoj kaj E-organizaĵoj komprenas tion kaj agas akorde sur tiu tereno, des pli rapide ni atingos signifajn konkretajn rezultojn.

**Nikola Nikolov**